Esperanto Societo Frankfurto

Esperanto-Informilo

Oktobro 2026

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Foto: G. Hennemann, la 1-an de septembro 2026: “En la urbeto Freudenberg la preĝejo aspektas situi ekster la urbocentro”.

Mesaĝo de la prezidanto: “Lasu la preĝejon en la vilaĝo” estas konata germana proverbo” kio signifas, ke oni ne trograndigu aŭ troigu aferojn. Laŭ mi la politika situacio en germanio en la lastaj semajnoj ne tiom ŝanĝiĝis, malgraŭ la sukceso de rasista kaj naziema partio AFD dum la lastaj du balatoj en orienta Germanio maltrankviliĝas. Aliflanke estas jam longe konata fakto ke la malnovaj popolpartioj pli kaj pli ŝrumpadas je la profito de novaj partioj kiu promesas dubendajn alternativojn. La AFD kaj ankaŭ la BSW estas novformitaj partioj, kaj ili ankoraŭ mem ne regis en io parlamento. Pro tio estas simpla aroganteco de la AFD-prezidantino nomi sian partion jam nun posteulo de la popola partio CDU.

Ĝis, G. Hennemann

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo
La 6-an de oktobro 2026

“Elsendo de E-Informilo“

_____

Dua mardo
La 13-an de oktobro 2026
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Jitsi

Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

_____

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 20. Oktober, 2026 --- Mardo, la 20-an de oktobro, 2026

18:30 h Lingva rondo

“Politik” - “Politika glossaro”

G. Hennemann

19:30 h

Vortrag Prelego

“Über Giftpflanzen“ - “Pri venenaj plantoj”

R. Schwarzbach

_____

Kvara Mardo
la 27-an de oktobro
ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

El la klubo

17.10. sabato: ni prezentos nian kandidatiĝon por la UK 2029 al GEA, loko: Saalbau Gutleut, Frankfurto. Temas pri estrarkunsido de GEA kaj GEJ.
Partoprenos niaflanke Reinhard, Georgo (?), Ulriko.

14.11. sabato: ni renkontos denove GEAn por i.a. paroli pri nia kandidatiĝo por la UK 2029 al GEA, loko: Getingo (Göttingen). Partoprenos niaflanke Reinhard (?), Georgo (?), Ulriko.

30.11. lundo Limdato por anonci nian kandidatiĝon al UEA!
Tion devas tamen oficiale fari GEA por ni.

26.11. – 29.11. vendredo ĝis lundo: Virtuala Kongreso de Esperanto, organizata de UEA. Oni devas registriĝi antaŭe, ligilon vi trovos rete/je eventaservo, aŭ vi tajpu ĝin mane: vk.esperanto.net/2026/aligxilo/.

15.12. mardo: ĉi jare samtage okazos Zamenhoftago kaj nia decembra ESF-kunveno. Ni do festu ambaŭ okazojn samtage! Ĉiu kunportu kelkajn festrilatajn manĝaĵojn/kuketojn kajaŭ kunportu tasojn/trinkujojn ĉar ni kunportos ardovinon kiun ni varmegigu.

Foto de la tago, sendita de U. Fellmann, 17-an de septembro. “Mia hodiaŭa foto de la tago.“

Ĉu nia eduksistemo fiaskis ?

Eseo de Georg Hennemann

Okaze de ŝtataj elektoj 2026 (en Meklenburgo-Antaŭpomerio kaj Saksio-Anhalto): En kelkaj orientgermanaj ŝtatoj, la voĉdonparto de AfD inter 16- ĝis 24-jaruloj estis ĝis 36 procentoj (dum en aliaj regionoj kiel Berlino, la Maldekstra Partio estis pli domina). En Saksio-Anhalto daŭras tendenco, kiu jam evidentiĝis en pluraj elektoj en orienta Germanio, kaj plej lastatempe en Rejnlando-Palatinato: la AfD atingas signifan parton de la pli juna generacio. Fakuloj klarigas ĝian sukceson ne nur per TikTok kaj aliaj sociaj retoj, sed ankaŭ per zorgoj pri la estonteco, politika fremdiĝo kaj la kreskanta socia normaligo de la partio. Kaj ankaŭ en edukpolitiko fariĝas klare, kiel la ekskludemaj rakontoj de la AfD enradikiĝas. La partio, kiu estas klasifikita kiel konfirmita dekstrema ekstremisma organizaĵo fare de la Oficejo por la Protekto de la Konstitucio en Saksio-Anhalto, anoncas en sia balotprogramo ampleksan ŝanĝon de direkto en la eduka politiko. Ĝi volas "tuj fini" la "inkluzivan eksperimenton", kiel ĝi mem diras, kaj vastigi specialbezonajn lernejojn, kio signifas apartigi infanojn kun handikapoj. Rifuĝintaj infanoj ankaŭ estos instruataj ekskluzive en "specialaj klasoj". Laŭ la vizio de la partio, ili estos instruataj tie por kredigi al ili ke ilia restado en Germanio estas "nur provizora".

La strategio de ekskludo klare funkcias: La AfD trovas signife pli da subteno inter junaj balotantoj ol aliaj partioj. Inter 18- ĝis 24-jaruloj, ĝi akiris 42 procentojn de la voĉoj, dum la Maldekstra Partio ricevis 18 procentojn. La CDU estas aparte malantaŭe, atingante nur kvin procentojn en ĉi tiu aĝogrupo. Ĉi tiu trovo ne estas sen precedenco. Laŭ MDR, preskaŭ 40 procentoj de junuloj en Saksio-Anhalto voĉdonis por la AfD en la federacia elekto, dum la Maldekstra Partio atingis 27 procentojn. La ŝtataj elektoj de 2024 en Saksio, Turingio kaj Brandenburgio ankaŭ montris la kreskantan forton de la partio inter junuloj. Laŭ datumoj kompilitaj de la Fondaĵo Amadeu Antonio, ĝi aperis kiel la plej forta partio inter junaj balotantoj en ĉiuj tri ŝtatoj. Ĉi tiu evoluo ne plu povas esti priskribita nur kiel orientgermana fenomeno. Laŭ SWR, en la ŝtata baloto de Rejnlando-Palatinato en marto, la AfD atingis 21 procentojn inter balotantoj sub 25 jaroj, tiel certigante la unuan lokon - ĝuste antaŭ la SPD kun 20 procentoj.

Se oni legas tiujn altajn nombrojn de AFD voĉdonantoj inter junuloj, oni tuj demandas sin ĉu la instruo en niaj lernejoj fiaskis en la celo, transdoni la scion pri la komencoj de la faŝista diktaturo post la t.n. „Vajmara Respubliko“, kiu certe ankoraŭ estas temo en la lernejaj instruplanoj de la landoj. La partio AFD nuntempe proponas la samajn strangajn ideojn, kiuj tiam estis proponita de la naziaj populistoj. Kaj ankaŭ la cirkonstancoj similas al hodiaŭ. Mi ĉi tie nur volas mencii la naskokvanto kaj rilataj fenomenoj: En la Vajmara Respubliko — precipe inter la superaj klasoj — ĝi draste falis, kio estis konsiderata krizindikilo. Dum komence de la 1900-aj jaroj virinoj havis averaĝe ĉirkaŭ kvar infanojn, antaŭ 1930 ĉi tiu nombro falis al apenaŭ du. Berlino elstaris (tiam kiel nun). Ĝi ne nur estis konsiderata unu el la plej grandaj kaj plej modernaj urboj en la mondo, sed en 1933 ĝi ankaŭ havis la plej malaltan naskokvanton kaj la plej altan divorcoftecon tutmonde. Sekve, la urbopejzaĝo, precipe en la pli riĉaj distriktoj (Wilhelmsdorf, Charlottenburg), estis dominita de seninfanaj paroj aŭ familioj kun nur unu infano. Tiel, eĉ antaŭ jarcento, on konsideris Berlinon malvirtejon (germane: Sündenpfuhl)” kaj "nesto de maljusteco" kaj seninfaneco; multpartnereco kaj hedonismo estis parto de dekstraflanka diskurso. Malantaŭ tio kuŝis (en ripetiĝanta paralelo al hodiaŭ) ne nur ideologie motivita rezisto al emancipiĝo, sed ankaŭ ekonomiaj zorgoj. La faŝisma respondo venis tuj post la nazia potencpreno en 1933. Virinoj konsiderataj "arjaj" kaj "genetike sanaj" estis kuraĝigitaj naski infanojn per diversaj ideologiaj kaj materiaj mekanismoj. Ideologie, patrinoj estis levitaj al la statuso de "portantoj de la ŝtato", kaj kiel virinoj, ili ricevis la "devon doni infanojn al la popolo, al la raso". Ekonomiaj instigoj estis provizitaj per geedziĝaj pruntoj kaj financa subteno por grandaj familioj ekde 1933. Ĉi tiujn instigojn

akompanis malpermesoj kaj perforto, kiuj iom post iom intensiĝis: Ekde 1941, kontraŭkoncipiloj estis malpermesitaj, kaj ekde 1943, "arjaj" virinoj, kiuj faris abortojn sur fetoj konsiderataj "sanaj", alfrontis la mortopunon.

La faŝisma respondo estis ampleksa eduka projekto dizajnita por produkti kontroleblajn, malmolajn kaj disciplineblajn homojn. ‘Germanio ne estu "kokinejo en kiu ĉio kuras kune kaj ĉiuj grakas kaj krias", sed prefere "popolo" kiu lernas esti disciplinita de frua aĝo. (Hitler, 14-a de septembro 1935)’. "Arjaj" civitanoj laŭsupoze estis kontraŭ-intelektaj kaj kontraŭ-individuaj kaj kunfandiĝas en la nacian komunumon.

La arko al hodiaŭ: “Demokratio ne estas regformo, kiu sin mem subtenas. Ĝi devas esti lernata kaj praktikata.” Fone de kreskantaj ekstremismaj sintenoj, fakuloj postulas pli fortan politikan edukadon en lernejoj – kaj tion en multe pli frua stadio ol estas nuntempe la kutimo. Prof. Tonio Oeftering, fakulo pri politika edukado ĉe la Universitato de Oldenburg, pledas por la integro de politika edukado en la instruplanon jam en la bazlernejo. Infanoj evoluigas ideojn pri politikaj temoj multe antaŭ ol kutime komenciĝas formala politika edukado. "Infanoj jam havas konceptojn pri potenco, justeco aŭ milito antaŭ ol ili ricevas ajnan politikan instruadon. Ili aŭskultas novaĵojn, atestas diskutojn hejme kaj estas aktivaj en sociaj retejoj," Oeftering diris al la gazeto *Hannoversche Allgemeine Zeitung*. Se sistema politika edukado komenciĝas nur en la adoleska aĝo, lernejoj cedas tiun kampon al aliaj influoj. "Se sistema politika edukado komenciĝas nur dum la adoleska aĝo – kiel foje okazas – lernejoj lasas tiun kampon al aliaj sociigaj agentoj," diris la profesoro.

Mi volas fini per du famaj citataĵoj de konataj aktivistinoj, Esther Bejarano (1925–2021) kaj Angela Y. Davis (1944 –)

Esther Bejarano
ĉe manifestacio kontraŭ la
Nacidemokratia Partio de Germanio (NPD)
en 2009

A. Y. Davis en 1974

"Ne sufiĉas esti kontraŭfaŝisma; oni devas ankaŭ agi kontraŭfaŝisme" — Esther Bejarano

“En rasisma socio ne sufiĉas esti nerasisma; ni devas esti kontraŭrasismaj.” —Angela Y. Davis

Ligiloj:
https://www.news4teachers.de/2026/09/42-prozent-bei-den-jungwaehlern-warum-die-afd-eine-generation-erreicht-die-anderen-parteien-entgleitet/
https://www.news4teachers.de/2026/03/studie-ein-drittel-der-juengeren-offen-fuer-rechtsextreme-ideologien-wissenschaftler-fordert-politische-bildung-schon-in-der-grundschule/
https://www.bpb.de/themen/linksextremismus/dossier-linksextremismus/33612/antifaschismus-als-thema-linksextremistischer-agitation-buendnispolitik-und-ideologie/

Diversaĵoj

Ŝercoj – kun kaj sen korekta uzo de la akusativo :)

Paciento: S-ro Doktoro, kiel mi iĝos 100 jarojn aĝa ?
Kuracisto: Ĉu vi fumas ?
Paciento: Ne !
Kuracisto: Ĉu vi drinkas alkoholon ?
Paciento: Ne !
Kuracisto: Ĉu vi ŝatas festi ?
Paciento: Tute ne !
Kuracisto: Sed pro kio vi nepre volas iĝi 100 jarojn ?

Proverbo de la monato (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon, kiu temas pri la speciala homa eco kaj apartaĵo:

„Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro“

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001881.htm

La enigmo de la monato
De Felmano Ulriko
Demandoj:
Ĉu en Germanujo okazis pli ofte Universalaj aŭ SAT-kongresoj?
Kaj kiu estis la honora prezidanto de la SAT-kongreso kiu okazis en Frankfurto ĉe Majno 1922?

Solvo de la kviza demando de la lasta ei:
La demando estis, kio rilate la diino Ateno en la montrita bildo el la filmo pri la Odiseado de Kristofero Nolan' estis malĝusta.
La solvo estas: La filmo montras la diinon kiel bela virino. Tamen, en la originala teksto, la diino aperis kiel bela viro.

Esperantaĵo

Koncizaj informoj pri nia agado rilate la plano okazigi Universalan Kongreson de Esperanto en Frankfurto ĉe Majno en la jaro 2029

De Felmano Ulriko

Verŝajne la plejmulto de vi jam sciiĝis pri tiu plano. Jam antaŭ tri jaroj mi proponis tiun planon, kaj multaj de nia klubo iam ekŝatis tiun ideon.

Kiun ni intertempe faris?

Je 20260718, dum restoracia manĝado, post nia somera ekskurso en la Frankfurtmajna palmoĝardeno, ni decidis nun ekagi laŭplane. El la kunestantoj, kvin decidis kunlabori en la UK2029-teamo, estis Ernst, Georgo, Hilde, Reinhard, kaj mi. Ni kolektis ideojn, defiojn, kaj temojn, kiujn mi notis en mian notlibron.

Jen la unuajn du paĝojn por doni impreson pri nia cerbumado:

La unua diskutrondo en la palmoĝardeno.





Poste alvenis pliaj subtenantoj, kaj la nomitaj personoj komencis fari siajn taskojn.
Ni ankaŭ ricevis informojn kaj ideojn de Esperantistoj el Darmstadt kaj Vizbado, kiuj informis pri eblaj alternativoj pri kongreshaloj en Darmŝtato, Fuldo, Majenco kaj Vizbado, en okazo, ke tio en Frankfurto ne funkcias. Intertempe mi mem informiĝis pri eblaj Frankfurtaj kongresejoj en la Goethe-universitato, en Kabo Eŭropo, kaj ĉe la kongresejo de la Ffa Foirosocieto.

Fotoj faritaj kiam mi iris al la universitato por demandi kiu respondecas pri la ebla ludono de konstruaĵoj kaj salonoj en ka universitato. La supra bildo montras la enirejon al la "Präsidium – Administration".

Iam ni decidis starigi regulan kontakton per vidkonferenca interŝanĝiĝo ĉiun unuan monatan mardon per Ĵitsio.

Nia loka UK-komitato intertempe kreskis al naŭ membroj:



Aldone, ni kreis tujmesaĝilan Telegramgrupon sub la nomo "UK 2029 en Frankfurto aŭ proksime" por ne plenŝtopi nian ESF-babilejon per niaj UK-diskutoj.

Tio estas la enireja simbolbildo de la Telegramgrupo. Ĝi montras Ludvik kaj Klara Zamenhof en Frankfurto en la jaro 1907.

Al la universitata respondeculo mi jam detale skribis kion ni ŝatus lupreni. La respondo estas tre pozitiva, la universitato povos ludoni kongresejnon jaj prelegejojn de diversaj grandoj kaj ankaŭ grandan kunvenejon por la solenaj malfermoj kaj fermoj, tamen restas multaj pliaj klarigendaj detaloj. La respondeculo lastsemajne estis en feriado, la interŝanĝiĝo do rekomencos venontsemajne. La interŝanĝon kun Kabo Eŭropo kaj pliajn esplorojn mi ankoraŭ devas fari, sed jam kolektis la bazajn informojn.

Unuaj impresoj de Kabo Eŭropo.

Kiu volas scii pli tiu povas demandi dum niaj realvivaj kunvenoj je la tria kaj kvara mardo, Georgo kaj mi ja preskaŭ ĉiam ĉeestas. Kiu volas subteni la aferon (aŭ eble eĉ povas imagi kunlabori en la onta LKK de ka UK 2029) tiu povas iĝi membro de nia supre menciita Telegramgrupo kaj partopreni niajn Ĵitsi-vidbabiladojn ĉiun unuan monatan mardon. La sekvaj do okazos je 6.10., 3.11., kaj 1.12.2026.

Lasta Paĝo

La usona prezidento Donald Trump subskribis ukazon, por ke Lago Ontario renomiĝu al Lago Ameriko en oficialaj usonaj dokumentoj. Ĉi tio okazas kadre de komercmilito kun Kanado.